

La mondovizio de Pierre Teilhard de Chardin

Endre DUDICH

La scienco ne estas demokratia.
La vero ne estas afero de voĉdonado.

Resumo

Pierre Teilhard de Chardin (1881-1955) estas unu el la grandaj pensuloj de la 20-a jarcento. Sciencisto, kiu tra spirite travidebla materia mondo vidas la transcendan Dion, kaj mistikulo, kiu en la persona Dio travivas la kreitan mondon. Laŭ li, la kaŭzo, motoro kaj celo de la dialektike dinamika evoluo de la Universo estas Dio. Pli konkrete, la amanta Kristo. (“*En la pulsado de la materio batadas la koro de Kristo*”).

Formulante sian mondovizion helpe de vortoj, *Teilhard* konscie evitas uzi la nociojn, terminojn de la tradiciaj filozofio kaj teologio bazitaj sur la doktrino de Sankta Tomaso de Akvino (13-a jc.), nome tiuj malhelpus la liberan flugadon de liaj pensoj kaj emocioj. Li prefere enkondukas vicon da novaj terminoj. Koni tiujn estas nepre necese por la legantoj de liaj verkoj. Estas do kompreneble, ke *Teilhard* ne disvolvis “sistemon” laŭ la tradicia senco. Eĉ nun oni ne rajtas kompili tiaĵon surbaze de lia tre riĉa skriba heredaĵo. Anĝelon oni ne povas enfermi en kaĝon.

La paleontologian verkadon de *Teilhard* (pri la “fenomeno Homo”) la scienca komunumo rekonis kaj aprezis. La Geologia Societo de Francio elektis lin ĝia prezidanto, kaj la Franca Akademio de Sciencoj ... ĝia membro. Male, la plej granda parto de la filozofoj kaj teologoj malkomprenis aŭ miskomprenis lin. Malgraŭ tio, ke liaj bazaj ideoj estas troveblaj en la skribaĵoj de la evangeliistoj Sankta Johano kaj Sankta Luko kaj de la apostolo Sankta Paŭlo.*

* Ĉio estiĝis per li [per la Vorto, tio estas per Kristo] kaj sen li nenio estiĝis. (Joh. 1, 3) – En li ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas. (Agoj 17,28) – Dio en li kreis ĉion en la ĉielo kaj sur la Tero, la videblajn kaj la nevideblajn... Ĉion Li kreis per li kaj por li. (Kol. 1,16-17) – Mi estas la *Alfa* kaj la *Omega*, la komenco kaj la fino. (Apokal. 21,6)

Teilhard estis ano de la jezuita ordeno. Li devis suferi humili-gajn malpermesojn. La ekleziaj instancoj malpermesis publikigi la plimulton de liaj verkoj. Li ne rajtis instrui, akcepti unversitatan katedron aŭ inviton al internacia scienca kongreso ktp. Eĉ al la papo – Pio la 12-a – li apelaciis sensukcese. Pri lia escepta morala grandeco atestas tio, ke li ne ribelis. Li obeis, submetis sin.

Entuziasmaj disĉiploj de *Teilhard* post lia forpaso aperigis liajn verkojn en multaj volumoj. Liaj ideoj iĝis publika trezoro de la mense malfermitaj intelektuloj de la mondo. Certe, ili estas malfacile kompreneblaj, kontestvekaj, ofte pasie disputataj. Ĝuste pro tio ili estas intelekte allogaj kaj stimulantaj.

1. Historia fono

Fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcento en Eŭropo bataladis diversaj ideologioj. Kelkiuj estis diagonale kontraŭaj unu al la alia. La strikte meĥanikisma mondkoncepto laŭ *Isaac Newton* ne povis adapti kaj digesti la evolu-teorion de *Charles Darwin* kaj *Ernst Haeckel*, devenintan el la biologio kaj geologio.

Anstataŭ la korpo+animo-dualismo de *René Descartes*, karakteriza trajto estis la kontrasto, eĉ sovaĝa lukto inter la **materiismo** kaj la **idealismo** (spiritualismo). Kiuj ne povis aŭ ne volis decidi, deklaris sin skeptikuloj aŭ agnostikuloj. La pinta produkto de la spiritualista orientiĝo estis la **kreanta evoluo** (*évolution créatrice*) de la franco *Henri Bergson*.

La germano *Oswald Spengler* aplikis la biologion al la evoluo de la homa socio. Li atribuis **ontogenezon** al la unuopaj homaj kulturoj, ekde la infaneco ĝis la maljuneco. Surbaze de tio li kreis altefikan verkon: *Untergang des Abendlandes* (Subeniĝo de Okcidentujo). La dato – 1918-1922 – evidente ne estas hazardo: la aŭtoron inspiris la traŭmo de la (unua) mondmilito.

La **katolika eklezio** luktis kun ŝajne nesolveblaj dilemoj. La Vatikano, perdinta la plej grandan parton de siaj ĉi-mondaj bienoj kaj povo, kaj ĉirkaŭfermita de la unuiĝinta Italio, decide fermiĝis ankaŭ siaparte, apartigante sin de la “mondo”. La **Unua Vatikana Koncilio** (1870) atestis pri obstina konservemo. La pastroj devis **fari kontraŭ-modernisman ĵuron**, kaj la legado de multaj mo-

dernaj verkoj iĝis malpermesita, ili iĝis registritaj en la **Indekso**. Papo Leo la 13-a en sia encikliko *Aeterni patris* (1879) emfaze rekomendis la filozofian sistemon de **Sankta Tomaso de Akvino** (13-a jarcento) al la katolikaj teologoj. Per tio la **nov-skolastiko** iĝis kvazaŭ la oficiala (tamen ne nepre deviga) filozofio de la katolika eklezio en ĉiuj kampoj: en la rapide progresanta naturscienco, kaj ankaŭ koncerne la sociajn / socialajn problemojn, kiuj iĝis pli kaj pli gravaj kaj urĝaj.

La konservema kontraŭstaro aperis ankaŭ en la **protestanta mondo**, ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en Nordameriko. Ekzemple en la urbeto *Dayton* (Usono) en la jaro 1925 okazis la fi-fama "simio-proceso": oni starigis iun junan mezlernejan instruiston antaŭ tribunalon pro tio, ke li estis instruanta al la lernantoj la darvinismon, la t.n. **simio-teorion**. Laŭ la verdikto li devis pagi monpunon (100 dolarojn). La leĝo iĝis nuligita nur en 1967.

Tamen jam komence de la 20-a jarcento komenciĝis singardema malfermo de la flanko de kelkaj teologoj. Brila ekzemplo pri tio estas en Hungario la 450-paĝa verko de *Ottokár Prohászka*, estonta episkopo de *Székesfehérvár*: "Tero kaj ĉielo" (1902). Laŭ la aŭtoro – tiutempe profesoro de teologio – la evoluo de la mondo, inkluzive tiun de la vivularo kaj la korpon de la homo, estas akceptebla por katolikaj fideluloj.

Dek tezoj de *O. Prohászka* (1902)

1. La evoluo de la materio belege akordas kun la kristana mondkoncepto.
2. La rakonto pri la ses-taga kreado, priskribita en la unua ĉapitro de la Biblio, ne signifas malfacilaĵon koncerne la akcepton de la evoluo. Male, ĝi forte rekomendas la ideon, ke la mondo estiĝis per la fortoj kaŝitaj en ĝi, ne per ripetitaj aktoj de kreado.
3. La evoluo de la materio kaj ties taŭgiĝo por porti la vivon estas neprocezo.
4. La kreita mondo estas plena fluo de feliĉa vivo, kiu devenas el Dio kaj returniĝas en Lin.
5. Sur aliaj ĉielkorpoj la vivo povintus produkti aliajn racihavajn kreaĵojn.
6. La Tero estas evoluanta sistemo, havanta organikan rilaton kun la flauro kaj faŭno.

7. La kaŭzo de la evoluo ne estas la vivmedio (*Lamarck*), nek la lukto por transvivo (*Darwin*), nek la hazardo. Tiuj eksteraj cirkonstancoj nur vekas la internan elastecon kaj influas al la direkto de la evoluo.
8. La evoluo de la Tero celas la vivon, kaj speciale la Homon.
9. La paleontologio prezentas al ni la ŝtoniĝintajn ideojn de Dio, la zoologio kaj botaniko liajn vivantajn ideojn.
10. Ni sopiras por kredo sen superstiĉoj kaj scienco sen antaŭjuĝoj.

En tian mondon naskiĝis *Pierre Teilhard de Chardin*. Li persone travivis, prisuferis tiujn konfliktojn, kaj faris eksterordinaran fortostreĉon intelektan kaj emocian por forigi ĝin. Kompreneble la vere pioniran verkon de *Prohászka* li ne konis: ĝi ja aperis – kun eklezia aprobo, "*Nihil obstat*" – nur hungarlingve...

2. Biografia skizo

1881 *Pierre Teilhard de Chardin* naskiĝas en *Sarcinat*, Francio.

1898 Abiturienta ekzameno, specialigita pri matematiko.

1898 Aliĝas kiel novico al la Societo de Jesuo (la jezuita ordeno) en *Aix-en-Provence*. Filozofiaj kaj teologiaj studoj en Francio kaj Britio, instruista praktiko en Kairo.

1911 Ordinita pastro.

1913 Kun *Abbé Breuil* li vizitadas la grotmurajn pentraĵojn de la prahomo en nordokcidenta Hispanio (*Altamira*).

1915 Kaporalo de sanitara taĉmento. Servas sur la fronto. Du distingoj. Verkoj: *La kosma vivo* 1915, *Kristo en la materio* 1916, *La mistika medio* 1917, *La pastro* 1918.

1919 Eliĝinte el la armeo, *P. Teilhard de Chardin* iĝas "Kavaliro de la Legio de honoro", kaj faras la trioblan voton de ĉasteco, malriĉeco kaj obeemo. – *La spirita potenco de la materio* 1919.

1920 Ŝtataj ekzamenoj en la Universitato *Sorbonne* en Parizo pri geologio, botaniko kaj zoologio. Diplomverko: *Geologio de la insulo Jersey*. Prelegas pri geologio kaj paleontologio en la Katolika Instituto en Parizo. Amikiĝas kun *Edouard Le Roy*, matematikisto kaj filozofo.

1922 Defendo de sia disertacio de doktoro pri fosiliaj mamuloj. Iĝas adjunkto de la Katolika Instituto.

1923-24 Vojaĝo en Ĉinio kaj Mongolio. – *Meso pri la mondo* 1923

- 1926 *La dia medio* 1926. Diskutoj kun la rusa geofiemiisto *V.I. Vernadsky*. – Ricevas malpermeson instrui en la Katolika Instituto.
- 1926-30 Pluaj ekspedicioj en Ĉinio, Mongolio kaj Somalio. *Pierre Teilhard de Chardin S.J.* iĝas konsiliano de la Geologia Servo de Ĉinio, kaj iom post iom transprenas la gvidadon de la elfosaĵoj de la trovloko de *Sinanthropus pekinensis* en *Ĉu-ku-tien*, proksime de Pekino.
- 1930 Partoprenas en la mez-azia ekspedicio de la usona Muzeo de Naturhistorio.
- 1931-32 “La granda flava krozado” en Ĉinio kaj Mongolio. *La Vojo de Okcidento al la nova mistiko* 1932.
- 1933 Liaj superuloj malpermesas akcepti ajnan postenon en Parizo.
- 1934 Surterenaj laboroj en Ĉinio. Kelkajn monatojn en Francio kaj Usono.
- 1935 Partopreno en ekspedicio de la usona universitato *Yale* en Hindio.
- 1936 Ekspedicio en Birmo, vizito al la insulo Javo.
- 1937 En Francio kaj Usono. Malpermeso eldoni sian libron *La homa energio* 1937.
- 1938-46 Longa restado en Pekino. *P. Teilhard de Chardin* fondas tie Instituton de Geobiologio, lanĉas novan sciencan revuon “Geobiologio”. Diligente verkas: *La atomismo de la spirito* 1941, sian ĉefverkon *La fenomeno Homo*, 1942, *Kristanismo kaj evoluo. Sugestoj por nova teologio* 1945.
- 1946 Revenas Francion, kaj amikiĝas kun la fama biologo *Sir Julian Huxley*.
- 1947 Alta distingo: *P. Teilhard de Chardin* iĝas “Oficiro de la Legio de honoro”. – *La homa relanĉo de la evoluo kaj ĝiaj konsekvencoj* 1947. – Ricevas striktan ordonon, ke li ne skribu plu pri filozofiaj temoj. Post tio manifestiĝas ĉe li la unuaj simptomoj de kor-malsano.
- 1948 Malpermeso akcepti la katedron proponitan al li en la Kolegio de Francio. *P. Teilhard de Chardin* petas aŭdiencon de papo Pio la 12-a, por ke li nuligu la malpermesojn. La aŭdienco estas fiasko.
- 1950 *P. Teilhard de Chardin* estas elektita membro de la Franca Akademio de Sciencoj, kaj prezidanto de la Geologia Societo de Francio. La eklezia cenzuro ne permesas lian verkon *La homo kiel zoologia grupo* 1950.

- 1951 Vojaĝo al Sudafriko, poste al Novjorko. Li ekrezidas tie. – *Mensa sojlo sub niaj piedoj. Ekde la kosmo ĝis la kosmogenez* 1951.
- 1953 Vojaĝo al Sudafriko kaj Rodezio.
- 1954 Du monatojn hejme en Francio.
- 1955 Malpermeso partopreni en la Internacia Paleontologia Kongreso. – La 10-an de aprilo, la Dimanĉon de Pasko, *Pierre Teilhard de Chardin*, 74-jaraĝa, forpasas pro infarkto (koratako).

3. Evoluanta kreitaro

3.1. Vizio ... Alfa kaj Omega

La mondovizio de *P. Teilhard de Chardin* estas laŭvorte vizio. Ĝi ne estas scienca mondkoncepto konstruita per senemocia, pura logiko, sed grand-elana travivaĵo de unueco, senpera aŭdaca salto el la scienco al la mistiko.

Estas do memkompreneble, ke *P. Teilhard de Chardin* konscie kaj decide ne uzis la tradician filozofian-teologian terminologion, sed enkondukis novajn esprimojn. Ankaŭ pro tio estas malfacila tasko kohere kaj kompreneble prezenti lian originalan pensaron. Krome mi persone suspektas, ke li tiamaniere intencis iom konfuzi la atakontajn kontraŭulojn. (Sukcese, eble iom tro sukcese.)

Kia estas la mondo, kaj kiel ĝi funkcias? Anstataŭ statika-meĥanika Kosmo *P. Teilhard de Chardin* viv-spertas dinamikan, organikan *Kosmogenezon*, potencan mondevoluon. Tio progresas ekde la punkto *Alfa* (la kreado fare de Dio) ĝis la punkto *Omega* (la fina kaj definitiva unuiĝo de la Kreitaro kun la Kreinto).

3.2. Dialektiko de la kosmogenez

La “mond-materio” (*Weltstoff*, li uzas en la franclingva teksto la germanlingvan terminon) de la *ultrafiziko* estas du-vizaĝa. Ekstere ĝi estas *materio*, interne ĝi estas *psihismo* (konscio).

Ankaŭ la manifestiĝo de la *energio* estas duobla: (1) *radiala* (interne organizanta) kaj (2) *tangent*a (eksteren movanta).

La tri sinsekvaj paŝoj de la dialektika evoluo laŭ la terminologio uzita de *P. Teilhard de Chardin* estas: *diverĝo*, *konverĝo* kaj *emergo*. Ĉi lasta estas la apero de nova, pli alta nivelo de organiziĝo.

Sur la vojo de pli-kompleksiĝo de la aĵoj prezentas sin t.n. sojloj (*seuil*). Tiuj estas apartaj punktoj/eventoj, kie/kiam aperas nova, pli alta nivelo de organiziĝo:

- estiĝo de la vivo (*vitalisation*),
- homiĝo (*hominisation*),
- transhomiĝo (*ultrahominisation*), estonte.

La du decidaj paŝoj de la evoluo de la “fenomeno Homo” estas jenaj:

♦ *Noogenezo* (evoluo de la menso / intelekto): la apero de la pripensado, mem-konscia pensado) kaj de la *noosfero* (la sfero de la pripensanta intelekto) sur la planedo Tero;

♦ *Tutgloba sociiĝo* (evoluo de la unuiĝinta homa socio de la planedo Tero) kaj la kulpensado (kolektiva mem-konsciĝo de la tuta homaro).

3.3. Ne deismo, ne panteismo

La mondovizio de *Teilhard* estas evidente **kontraŭ-deismo**: Dio ne estas (nur) pasiva observanto “ekster” aŭ “trans” la unufoje kreita mondo. Male: “*en la pulsado de la materio batadas la koro de Kristo*”. Ne estas do mirinde, ke *Teilhard* plurfoje estis akuzata esti panteisto.

Tamen, laŭ *P. Teilhard de Chardin* la en si transcenda **Abso-luto, Dio, enestas en ĉio pere de sia kreanta, subtenanta kaj sanktiga aktiveco**. La evolucio, kiun li inicatis kaj direktas, finfine kondukas al unuiĝo (sed **ne identiĝo!**) kun li. Tiu tezo estas strikta teismo, sekve ĝi tute ne kontraŭdiras al la tradicia kristana koncepto.

3.4. Kristogenezo

La evoluo de la homaro, altirata de la **Omega**, iras direkte al la Persona Unuiĝo. **Finfine la kosmogenezo estas nenio alia ol Kristogenezo, formiĝo de la Kristosfero**. Tio estas la realiĝo kaj efektiviĝo de la fina celo, en la Pleneco de la tempoj (*pleroma*). La Omega-Kristo, identa al la *Logos* de Sankta Johano, movas-evoluigas la Universon.

4. Verkaro

La plej kompleta serio estas tiu de la pariza eldonejo *Seuil* (Sojlo), konsistanta el 13 volumoj.

I.	1955	La fenomeno Homo
II.	1956	La apero de la homo
III.	1957	La vizio de la pasinteco
IV.	1957	La dia medio
V.	1959	La estonto de la homo
VI.	1962	La homa energio
VII.	1963	La aktivado de la energio
VIII.	1964	La loko de la homo en la Naturo: la zoologia grupo Homo
IX.	1965	Scienco kaj Kristo
X.	1969	Kiel mi kredas
XI.	1973	La direktoj de la estonto
XII.	1976	La koro de la materio

Aperis ĉe la sama eldonejo, sed ekster la serio:

- 1965 La meso pri la mondo
- 1966 Pri la feliĉo
- 1966 Mi eksplikas min
- 1967 Pri la amo
- 1968 La pastro
- 1972 Mia universo
- 1974 Pri la sufero

Aliaj eldonejoj aperigis elektitajn skribaĵojn kaj kolektojn de la korespondado de *P. Teilhard de Chardin*.

5. Klarigo de fakvortoj / esprimoj

Amadizi – plenigi la evoluon per absoluta kaj persona amo, speciale tiun de la homa komunumo.

Diafaneco – la travidebleco de la Universo kiu ebligas al la konvene preparita kaj purigita „mensa okulo” ekkoni la ĉeeston de Kristo.

Dia medio – (1) ĝenerale: la Di-centra Universo; (2) speciale: Kristo direktanta la vivon de ĉiu homo.

Diverĝo – konverĝo – emerĝo – la tri fazoj de dialektika evoluo (tezo, antitezo, sintezo).

Geobiologio – scienco esploranta la *biosferon*, t.e. la tuton de la ne-memkonscia vivularo.

Homiĝo – laŭgrada transiro el la ne-memkonscia mondo de la animaloj al la mem-konscia mondo de la homo.

Konscio – ĉiu formo de psiĥismo, ekde la plej simpla ĝis la homa kunreflekto

Kosmogenezo – la universala, direktita, konverĝa evoluo de la Universo, kontraste al la Kosmo, kiun karakterizas ordigitaj, sed nur ciklaj moviĝoj.

Kunpensado – sociiĝo de la homa (mem)pripensado: la kolektiva konsciiĝo de la tuta homaro

Noogenezo – (el la greka vorto “νοῦς” = intelekto, menso, racio) – evoluo de la konscio akompanata de kompleksigi de la materio.

Noosfero – la sfero de la homa konscio de Tero. Ĝi estas nova evoluŝtupo kompare al la biosfero, el kiu ĝi emerĝis kaj nutras sin.

Pleromo – grekdevena termino prunteprenita de la apostolo Paŭlo. Ĝi signifas plenecon, pleniĝon, kompletiĝon. Temas pri la unuiteco de la tuto de la kreitaĵoj kun la kreanta Dio.

Punkto Omega Ω – Dio, kiel la celo kaj perfektigi de la Universo. Konkrete Kristo, la Dia Vorto (*Logos*), kiu okaze de la “fino de la mondo”, la dua alveno de Kristo, ĉion altiras al si kaj unuigas en si.

Radiala energio – tiu speco de la kosma energio, kiu estigas ĉiam pli kaj pli kompleksajn, intimajn kaj centritajn sistemojn.

Sociiĝo – la procezo de unuiĝo de la homaro, estiĝo de tutgloba, harmonia socio.

Tangentaj energio – tiu speco de la kosma energio, kiu estigas eksterajn rilatojn, diversajn interagojn de la materiaj estaĵoj.

Ultrafiziko – scienco klopodanta unuece interpreti la ŝajnan kontraŭecon de materio kaj spirito.

Ultrahoma stato – la stato de la unuiĝinta, kunsentanta kaj kunpensanta homaro, kiu estos pli klara kaj pli libera ol la nuna.

Weltstoff – germana termino vaste uzata en la monismo de *Ernst Haeckel*. Laŭvorte: *mondmaterio*. Temas pri la materio en la plej larĝa senco: “teksaĵo de la mondo”, el kiu la Universo konsistas. Ĝi estas du-vizaĝa: ĝia ekstera manifestiĝo estas la fizika materio, ĝia

interna manifestiĝo estas la konscio. Ĝi evoluadas direkte al la punkto *Omega*.

6. Citaĵoj el la verkoj de *P. Teilhard de Chardin*

6.1. Mondkoncepto kaj ekkono de la Vero

Antaŭ ĉio, kaj spite de iuj ŝajnoj, la *Weltanschauung* kiun mi prezentas, neniel signifas fiksan kaj fermitan sistemon. Ne temas (tio ja estus ridinda) pri iuspeca dedukta solvo de la mondo à la *Hegel*, iu definitiva enkadriĝo de la Vero, sed nur pri la fasko de la aksoj de progreso, kiel tio ekzistas kaj iom post iom ankaŭ manifestiĝas al ni en ĉiu evoluanta sistemo. Tio ne estas la elĉerpo de la Vero, sed iuj linioj de penetrado, pere de kiuj malfermiĝas antaŭ ni la nemezurebleco de la ankoraŭ ne esplorita Realo.

Alvenis la tempo rekoni, ke ajna interpreto de la Universo, eĉ se pozitivisma, por ke ĝi estu kontentiga, devas kovri kaj la internon kaj la eksteron de la aĵoj, la spiriton kaj la materion. Tio estas la vera Fiziko, kiu unu belan tagon sukcese integros la tutan Homon en unu koheran mondbildon... Vere, mi kredas, ne povus ekzisti, por pensanta estaĵo, pli decida momento ol tiu, kiam... – li malkovras, ke li ne estas estaĵeto perdiĝanta en kosma soleco, sed ke universala vivo-volo konverĝas en li, iĝante Homo. La Homo ne estas la statika centro de la mondo, kiel oni kredis dum longa tempo, sed la akso kaj sagopinto de la evoluo, kio estas multe, multe pli bela. (Antaŭparolo al la *Fenomeno Homo*, Pekino, 1938-1940.)

6.2. Entropion malkreskiganta evoluo

Fakto estas, ke por ĉiu moderna menso... naskiĝis ties sento, ke ekzistas iu universala, absolute specifa Moviĝo, dum kiu la Tuto de la aĵoj moviĝas solidare, de supre malsupren, kun unusola elano, ne nur en la Spaco kaj en la Tempo, sed en hiper-ejnŝtejna Spacotempo, kies speciala kurbeco konsistas en tio, ke ĝi igu ĉion moviĝantan ĉiam pli ordigita. (*Intelektaj sojloj sub niaj piedoj. Ekde la Kosmo ĝis la Kosmogenez*. – Parizo, 1951).

6.3. Kompleksiĝo

Oni povas diri, ke ĝis la Homo la Naturo klopodis estigi la unuon kaj grajnon de penso. Decide ŝajnas, ke ni estas jam lanĉitaĵoj, laŭ la leĝoj de iu giganta hiperĥemio, direkte al “konstruaĵoj

de pens-eroj”, al iu “penso de pensoj”, ĉiam pli alten, en la profundon de la senfine kompleksaj aĵoj. (*La Atomismo de la spirito*. – Pekino, 1941)

6.4. Konsciogenezo kaj kristanismo

Post dumil-jara ekzisto, laŭ la organika ritmo valida por la tuta Naturo, ĉu la Kristanismo, ĝuste ĉar ĝi estas senmorta, ne alvenis al tiu momento, kiam ĝi, por postvivi, devas rejuniĝi kaj renoviĝi, ne per ŝanĝo de strukturo, sed per la adopto de novaj elementoj?

Alivorte, en la nuntempa krizo, kiam antaŭ niaj okuloj kaj en niaj koroj konfrontiĝas la tradiciaj fortoj de la kristanismo kaj la modernaj fortoj de la evoluo, ĉu ni ne devus rekoni en tio la providencan eblecon de necesa kaj nepra fekundiĝo? Mi kredas, ke jes. Sed tiam estas klare, ke por estigi sintezon, la kristanismo, sen modifi sian starpunkton sur la supro, devas larĝe malfermi siajn aksojn, por brakumi kaj adopti, laŭ ties tuto, la novan, de malsupre supren strebant, pulsantan energion religian, por sublimigi ĝin. (*Kristanismo kaj evoluo. Sugestoj pri nova teologio*. – Pekino, 1945)

6.5. Kosmogenez - Kristogenezo

Dum la unuaj jarcentoj de la Eklezio (la Kristosfero) la ĉefa klopodo de la teologoj estis determini racie (pere de la Intelekt) kaj mistike (pere de supersensa, senpera ek-sperto) la pozicion de Kristo rilate al la Sankta Triunuo. Nuntempe la centra tasko estas ĵena: analizi kaj precizigi la rilatojn de ekzisto kaj efiko inter Kristo kaj la Universo. – Kio koncernas la rilaton inter Kristo kaj la Universo, la tuta nuntempa teologio en la kristana konscio koncentriĝas en tio, kion mi povus nomi la Universala(la) Kristo...

Necesas konfesi, ke la pozicio de Kristo estas mirinda. Sed ĝuste pro tio, ke laŭ la vera skalo de aĵoj ĝi fakte estas eksterordinara. Jes, la fina ŝtono de la konstruata volbo estas en niaj manoj. Por estigi la sintezon de la kredo je Dio kaj de tiu je la Mondo, tiomgrade aspiratan de nia generacio, ĉu oni povas fari ion pli bonan, ol dogme malkaŝi tiujn kosmajn vizaĝon kaj funkcion de la persono de Kristo, kiuj igas Lin organike la movanta kaj gvidanta principo, la “*animo*” de la evoluo?

Al tiu proceduro, ke la Kriston-Redemptoron ni ĝeneraligu je Kristo-Evoluiganto (kiu, kune kun la pekoj, portas ankaŭ la tutan pezon de la mondo), ke al la historia Kristo ni atribuu universalan

fizikan funkcion, ke ni finfine *identigu la Kosmogenezon kun Kristogenezo*, oni povas kontraŭargumenti. Nome, ke tio riskas paliĝi en la Superhoma, dispersas en la Kosma la homan realon de Kristo.

Laŭ mi tiu hezitado estas tute senfundamenta. Nome ju pli oni meditas pri la fundamentaj leĝoj de la Evoluo, des pli oni konvinkiĝas pri tio, ke la Kosma Kristo ne povus aperi je la fino de la tempoj sur la Pinto de la Mondo, se pli frue, dumvoje, ne estus iĝinta, pere de sia (homa) naskiĝo, unu el ties elementoj. Se fakte la Omega-Kristo movas la Universon, tiam li ĉerpas sian realan konsiston ĝuste el sia konkreta ĝermo, el la Homo de Nazareto, kaj teorie kaj historie, por nia sperto. – Tiuj du terminoj estas intime solidaraj inter si, kaj en la vere perfekta Kristo povas validi nur samtempe.” (*Kristanismo kaj evoluo*. – Pekino, 1945).

6.6. Mistika unuiĝo

Ni ne povas iĝi perfekte kaj ne-elĉerpeble feliĉaj aliel, nur en persona unuiĝo kun io Persona en la Tuto, kun la Personaĵo de la Tuto. (*Letero*, 1933).

6.7. La punkto Omega

Mi donis, konvencie, la nomon “punkto Omega” al la supozita supra poluso de la homa konscia, al si mem direktata kumpensado.

Realeco, Kompletigeblo, Nereturneblo: jen la tri ecoj necesaj por karakterizi la naturon de la Omega, elirintaj el ties supozita kapablo de aktivigo. Sed – ĉu tiuj tri sufiĉas? Ne eblas respondi al tiu ĉi demando sen decidi pri iu teoria problemo, kiun mi ĝis nun lasis ĉe la filozofoj ... finfine de ĝi dependas la tuta energetiko de la fenomeno Homo. En la konverĝa Kosmogenez, kiel jam dirite, ĉio okazas tiel, kvazaŭ la savebla enhavo de la mondo dum la evoluo koncentriĝus kaj konsolidiĝus en la centro de la globo reprezentanta la Universon.

Mi decidis resti ĝis la fino de ĉi tiuj paĝoj sur la kampo de la faktoj. Do mi ne eniros en metafizikajn konsiderojn, kiuj neeviteble distingus en la teksaĵo de la aĵoj la sekundaran aŭ partonricevantan estaĵon [la kreitaĵojn] kaj la primaran aŭ nepran estaĵon [la Kreanton]. Tamen mi devas emfazi la grandegan praktikan

diferencon koncerne la evoluigan eksciton en la du kazoj, nome la *unuiga* hipotezo kaj la *unuiga* hipotezo.

– En la **unua kazo** (kiam la Universo unuigas sin mem, per konverĝo de siaj elementoj), la evoluo sendube iĝas valorigita, sed en strikte nepersona atmosfero de la komunumo.

– En la **dua kazo**, kiam la unuigo de la Universo okazas sub la efiko de iu jam ekzistanta *Plej supra Afo*, do finfine estas ligita al iu *Plej supra Ulo*, ĝi ricevas amon, “*iĝas amadizita.*”

Ĉi lasta... estas nedisputeble pli superakvalita, por liberigi nian agadkapablon, ĝis la fundo de nia animo.

Ĉiam pli evidentiĝas, ke ... la evangelia Amo (*Charité*) estas esence nenio alia, ol la amo de la ĝisfunde kristiĝinta Kosmogenezeto.

7. Preĝo de P. Teilhard de Chardin

Estro de miaj infan-aĝo kaj vivo-fino, Dio:
 finita en Vi mem, tamen por ni senfine estiĝanta,
 Dio, kiun ni adoras kiel Evoluigantan kaj Evoluantan,
 Vi, la unusola, kiu povas nin kontentigi,
 dispelu fine la nubojn, kiuj ankoraŭ kaŝas Vin de ni,
 la malicajn antaŭjuĝojn kaj la falsajn miskredojn,
 ke tra la Mondo iĝinta travidebla
 incendie ekflamiĝu Via ĉion penetranta ĉeesto.

Tiel estu.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Endre DUDICH

Károlyi M. u. 14/B

HU-1053 Budapest / HUNGARIO

<dudich@t-online.hu>

Priaŭtora informo

Geologo, biologo-ĥemiisto. Tit. profesoro pri geologio de la Okcident-hungaria Universitato (*Sopron*). Asoc. Prof. de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. Honora prezidanto de la budapeŝta Filozofia Diskutrodo kaj de Hungaria Esperanto-Asocio. Honora membro de Universala Esperanto-Asocio.

Nia akvomanio

Martin EBNER

Ŝpari akvon en la malĝusta loko nenion utilas al la natura medio

Dentopurigante fermi la akvokranon kaj ekipi la necesejan pelvon de akvoŝprucklozeto per ŝpar-premklavo: nu, akvoŝpari estas treege facile. Bonkondukte kaj obeeme, ekzemple, la loĝantoj de la “hansa urbo” *Kiel* en norda Germanujo avaregos pri ĉiu akvoguto. Same kiel la ceteraj germanoj ili malpliigis dum la pasinta jardeko sian akvokonsumon per ĉirkaŭ 20 procentoj.

Bedaŭrinde la peno estas vana: la akvotuboj estas – por optima funkciado – konstruiciitaj laŭ minimuma traflo. Por preventi rustdamaĝojn kaj patogenajn ĝermojn, nun la akvodistribuejo de la urbo Kielo en ĉiu tago devas fluigi pli ol 4000 kubajn metrojn da akvo tra sia kanala reto – sole por tralavi ĝin. Tio egalas al la konsumo de 33 000 personoj.

Iom post iom oni nun mallarĝigas la kalibron de la tuboj. Sed tio kostas por unu metro pli ol 1200 eŭrojn – duoble pli ol tute novaj duktoj. Tiumaniere oni “forŝparas” eble la akvoprotektajn regionojn, al kiuj minacas ĉesigo pro la regresa akvobezono. En tiu ĉi rilato oni devas konsideri, ke en Germanio ĝenerale ne ekzistas malabundo da akvo, escepte en kelkaj sekec-lokoj kiel ekzemple la Ŝvaba Ĵuraso.

Esploristoj: akvo estas renovigebla resurso

Krom apartigi rubaĵojn la germanoj preskaŭ nenion ŝatas pli ol avari per akvo. Por kapo kaj tago ili konsumas mezkvante nur po 1450 litrojn, el tio por la mastrumado po 126 litrojn. Tio estas preskaŭ mondorekordo; en la industrilandoj nur la belgoj malpli elkranas. La tutmonda averaĝo estas ĉirkaŭ 2000 litroj.